# *Margaret Chan vizitas Kubon por la tria fojo.*




La ministro pri publika sano de Kubo, Roberto Morales Ojeda akceptis en Havano la ?eneralan direktorinon de la monda organizo pri sano (OMS), Margaret Chan kiu dankis al la insula registaro pro la invito.
Dum rapida dialogo kun la gazetaro ?i sciigis ke temas pri la tria vizito al Kubo “kaj kontentas reveni, ?ar ?iam lernas ion novan pri la sciencistoj kaj la kubaj gelaboristoj de tiu sektoro”.
Chan esprimis ke spite al tio ke ?i plenumos tre intensan laborprogramon, ?i restas kontenta pro la ebleco lerni kion oni faras nuntempe rilate al esplorado, biofarmaciaj produktoj kaj ?io okazanta en tiu sektoro.
La ?enerala direktorino de la OMS vizitos la centron de genetika in?enierado kaj bioteknologio (CIGB), la centron de imunoesploroj kaj la centron de molekula imunologio. Krome, ?i prelegos en la sidejo de la ministerio pri publika sano.
La? informo de la insula gazeto *Granma*, akompanas ?in la direktorino de la tutamerika organizo pri sano Carissa F. Etienne.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/28375-margaret-chan-vizitas-kubon-por-la-tria-fojo

# Radio Habana Cuba